

Ge-sroj Micard provas ŝrovi liberan ĉambron por ĵusalveninto

organizado de asocio)... Ĉu tia afero povos vivi kaj prosperi. Mi opinias jese... » En tiu unua cirkulero oni trovas la tutan homon Micard. Li opiniis necese fari ion. Li tuj decidis provi kaj ne proponis « nubojn » sed faris klarajn proponojn. Li eĉ trovis la dejoranton : sin mem (kaj kompreneble. Sinon Micard) ; li kuntrenis bonvolemulojn nur ĉar li mem donis ekzemplon. Li estis preta sin dediĉi al la proponitaĵo.

La respondoj estis multaj kaj kuraĝigaj. Sed la tiujara somera lernejo povis okazi nur dum II tagoj en Houlgate dank'al la helpo de ne-esperantista amiko de Micard. Urĝis la realigo de la « sonĝo ». La 16-an de Septembro kun nur iom pli ol unu miliono en la provizora kaso, asocio estis leĝe starigita en Parizo. Ĝi ricevis la nomon « Kulturdomo de franclandaj Esperantistoj ». La estraro konsistis ĉefe el GEE-anoj kaj Micard estis la Prezidanto. La celo de tiu Asocio estis : aĉeti domon, bienon, materialon disponigotan al la Esperantistoj por iliaj renkontoj, distriĝoj kaj kulturiĝo.

La unua paŝo estis irita. La estonteco ŝajnis sennuba.

SED... Dumtempe vendiĝis la domo en Sablé. Alia vendota domo ekzistis apud Sablé, en urbeto Brûlon. Sed ankaŭ tiu espero vantiĝis. Nova cirkulero estis sendita al la konsilianoj de la nova asocio. Ĉu Micard malkuraĝiĝis ? Tion pensus, kiu ne konis lin. « Mi ne kutimas longe insisti pri la pasinteco, kaj laŭ mia penso Brûlon estas jam pasinteco... Mi devas viziti la 18-an de Oktobro du kasteletojn : la unuan je du kilometroj de Baugé ; la alian en Baugé mem ».

La 19-an de Oktoro nova cirkulero per kiu Micard sciigis, ke li vizitis la Kastelon Grésillon : regiono agrabla, bone situita ; kastelo belaspekta sed sen elektra lumo nek akvo en la ĉambroj ; ĉio estis ebla por la estonteco ; sufiĉus ke oni trovu ankoraŭ unu milionon (kiun oni bedaŭrinde ne trovis).

Tiu manko de mono estis grava malhelpaĵo kaj devigis Micard fari multajn vojaĝojn al Baugé por provi havi pli favorajn kondiĉojn. Estis necese apartigi la bienon en du partojn ĉar la tuto estis tro multe kosta. Fine interkonsento atribuis al la Kulturdomo 8 hektarojn kun la konstruaĵoj por tri milionoj, kaj la 4-an de Novembro estis oficiale subskribita la interkonsento. Tuj estis pagitaj 1.500.000 fk. La cetera sumo estis pagota en tri par-